Mi sopiras

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart kaj Nataŝa

Mi sopiras kiam vi forestas
Mi malbonas kiam vi apudas
Ie restis niaj gajaj festoj
Kiel hela kaj foira budo.

Rf- I : Ĉu rimarkis vi ke malaperis
Niaj sentoj nur kutimoj restis.
Nur malnovaj kantoj en kajrero,
Nur leteroj varmaj kaj modestaj

Ni atingis multajn gravajn aĵojn
Ĉu memoras ni por kiu celo?
Ni atingis altan vivetaĝon,
Sed ne hejmon havas ni - hotelon.

Vi silentas, vi senvorta estas.
Nur rideto la vizaĝon ludas.
Ĉu sopiras vi se mi forestas?
Ĉu malbona,s kiam mi apudas?

Rf- I :